



Estrara Komunikilo: EKO 2016-40 sendita el Bunda, Tanzanio, la 31an de decembro.

La 6a Afrika Kongreso de Esperanto de UEA ĵus venis al fino; la okdeko da partoprenintoj iom post iom hejmenvojaĝas al lokoj en 14 landoj, multaj ekster la kontinento (Brazilo, Francio, Hungario, Koreio, Islando, Japanio). Afrikanoj venis el ok landoj (pluraj kun financa subteno de UEA aŭ TEJO), la granda plimulto kompreneble el Tanzanio, kun forta reprezentado de lokuloj el la urbo Bunda mem, aŭ la iom proksima grandurbo Mwanza. Entute estis 102 aliĝoj; kelkaj estis subtenaj aliĝoj, aliaj spertis vojaĝ-malfacilaĵojn kaj devis retiriĝi.



La malferma ceremonio okazis en merkredo, la 28an de decembro, ŝovita unu tagon pro la malfruiĝo en la alveno de la 11-persona korea karavano. La solenaĵo daŭris preskaŭ kvar horojn, kun multaj salutoj, vivaj (Afrika Komisiono, prezidanto de LKK, la vicprezidanto de UEA kaj aliaj) kaj laŭtlegetaj (de la Prezidanto de UEA, de ILEI, de IKEF kaj la korea grupo kaj JEI.) Aldoniĝis landaj salutoj.

La honora gasto en la malfermo estis s-ino Lydia Simeon Bupilipili, la Distrikta Komisiito por la distrikto Bunda. Ŝi estis en la lastaj monatoj nomumita de la ŝtata prezidento, d-ro John Pombe Magukuli. Ŝi parolis elokvente en la svahila kun traduko, kaj kun kelkaj frazoj en Esperanto. Temis grandparte pri evoluigaj projektoj en la distrikto – pli



Fotoj: SMG

bona akvo-mastrumo, lernejoj, infrastrukturo. Ŝi varme bonvenigos la engaĝiĝon de esperantistoj en tiuj taskoj – influita per vizito en la antaŭa tago al la Esperanto-lernejo en la vilaĝo Marambeka (40 km de Bunda), pri kio ni esperas raporti en estonta EKO.

Diskonigo de la kongreso okazis tre efike per grandioza futbalmatĉo, kiu altiris almenaŭ 500 lokulojn. Nesurprize, ĉar la esperanta teamo, en belegaj verd-blankaj uniformoj, ludis kontraŭ la loka teamo, ‘Bunda Veteranoj’. Konigo de la lingvo klare okazis; dum (sola) alpromeno, pluraj urbanoj kriis “Esperanto!” kaj eĉ “Saluton!”. La verda teamo ludis solide en la unua duono kaj



arigis du golojn kontraŭ nulo, kio rikoltis entuziasmajn kriadojn kaj banderolumadon de la esperantistoj. Sed tra la dua duono, ni rimarkis la nesfiĉan eblon por la E-teamo ekzercadi kaj provludi kune; ili eklaciĝis kaj ne sukcesis reteni la pilko-posedon. La fina rezulto (4-2 favore al la bundanoj) ĝojigis la spektantaron – ĉio finiĝis en bona etoso. La publiko kontinue aŭdis la vorton ‘Esperanto’, ĉar la matĉo ricevis laŭparolilan komentariadon – alterne aŭ samtempe en la svahila kaj Esperanto.

Okazis multaj programeroj, ne eblas mencii ĉiujn. Tra la lastaj tagoj okazis ekzamenoj de UEA/ILEI. 25 bravuloj prezentis sin por la antaŭtesto, el kiuj 20 rajtis pluiri. En la unua nivelo, ok el la dek du provantoj sukcesis; en la dua nivelo, ĉiuj ok provantoj atingis sukceson, kun iom similaj kaj altaj poentaroj. Entute bonis la lingva nivelo.

Memorinda kongreso, klare la plej granda kaj plej varia el la ses ĝisnunaj afrikaj kongresoj de UEA.

Vortoj: 460

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo.

Se vi volas vidi pli malnovajn komunikojn iru al: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

PDF kreita de Nuance Power PDF.